

The BRITISH ESPERANTIST

THE OFFICIAL ORGAN OF THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION.

ISSUED ON THE 15TH OF EACH MONTH.

Hon. Editor, F. RICKETT SHELTON.

VOL. XVIII. No. 205.

APRIL, 1922.

SES PENCOJ.

ABONO.—Abono estas komencebla je iu ajn monato. La prezoj estas: En la Britaj Insuloj, afrankite: por unu jaro, 6 ŝilingoj; por ses monatoj, 3 ŝilingoj. Eksterlande, afrankite: por unu jaro, 6 ŝilingoj per poštmandato (aŭ ĉeko) aŭ 30 stampitaj respondkuponoj; por ses monatoj, la duono de tiu prezo. Ĉiu membro de la Brita Esperantista Asocio ricevas la gazeton senpage.

Oni bonvole sendu abonojn al la Sekretario de la Brita Esperantista Asocio, 17, Hart Street, Londono, W.C.1, Anglujo.

REDAKCIO.—Manuskriptojn k.t.p. oni bonvole sendu al la Redakcio de la *British Esperantist*, ĉe la supra adres. La Redakcio rezervas la rajton korekti erarojn de stilo, k.t.p. Ordinare oni ne resendas manuskriptojn neuzitajn.

ANONCOJ KAJ REKLAMOJ.—Pri tiu fako oni sin turnu al la Administranto de la B.E.A.

ENHAZO.

	Pago
Editorial	33
Month by Month.—Thirteenth British Esperanto Congress	34
Esperanto at the Royal Institution.—League of Nations.—Genoa Conference.—Memorial to the League of Nations	35
Esperanto Magazine for the Blind.—Esperanto Progress Abroad	36
Kroniko.—Obituary	37
Tra la Libraro.—Tra la Gazetaro	38
Esperanta Centra Oficejo.—Helsingfors Congress	39
B.E.A. Official Notices, etc.	40

EDITORIAL.

Ne gutas mielo el la fielo.

NOTHING for nothing in this world and that means for the most of us nothing without work. But also, no right effort is wasted, and, although results may not appear proportionate to energy expended we should take to heart Browning's great word: "There shall never be one lost good," and, having made our best effort, forthwith proceed to make a better. "Do the duty that lies nearest" said Carlyle, "and thy second duty shall already have become clearer."

There is a text for all our present members and encouragement for those who are honestly trying to get new members, to extend the influence of Esperanto, to strengthen the movement in all possible ways. We have no easy task ahead of us, for the world is tired and strained after the War, which left effects only now becoming manifest in all their bearings, effects that will abide. Seeing how deep and extensive the damage is, we should be the more urgent and persistent to use every opportunity of helping towards conditions that will make future war less possible.

Esperanto is the greatest neutral movement that this world has ever seen; yet, while neutral, it has in it the spirit of the highest

ethic:—Brotherhood and justice among all peoples. So, to every individual member we say, consider now all whom you know who have the qualities that might make a good Esperantist; consider then, and even more carefully, what kind of appeal you can make to such, and how best you can make it in order to secure interest; then go forward, spare no effort, and may success attend you.

* * * * *

Eble la plej forta atesto pri la klarvido de Zamenhof estis lia respektego al la vero. Homo, kiu rigardas pure, vidas vere, kaj la vero, vice, benas lin per pli etendita vidado. Tra sia tuta vivo Zamenhof multe suferis pro la malvero en malamikoj, en falsamikoj. En la Ekzercaro (22.7) li skribis ". . . vi estas ankoraŭ nun ĉiam mensoganto." Konsideru: "ankoraŭ" enhavas sendifinan tempon pasintan; "nun" signifas "en ĉi tiu momento"; "ĉiam" ampleksas ĉiun tempon, tial la venontan. Sekve, la persono de tiu diro estas proklamita estinte, estante kaj estonte mensoganto. Sed Zamenhof estis enkorpigita homamemo. Kiom, do, li ja estas suferinta, antaŭ ol li povis imagi tiun bruligan mordan kondamnon! Plie, tiu estas pura, klasika lingvajo, kaj oni povas skribi tute bone,—Zamenhof mem estas ankoraŭ nun ĉiam helpanto.

MONTH BY MONTH.

SHORTLY after the publication of this article, namely, on Saturday, 15th April, the Council of the Association will meet at Birmingham, at the invitation of the Midland Esperantist Federation. The 27th Conference of that Federation will be held on the same day, and during the week-end they will organise other activities.

Groups and Federations are reminded that under the new arrangements made last year Council Meetings take place in different parts of the country and not usually in London, as previously.

The following meeting of the Council will occur in London after the Annual Meeting, during the Congress at Whitsuntide, and in the normal course of events another meeting should be held about September. There should be keen competition among Groups and Federations to secure the acceptance of an invitation to the Council to meet in their area, and it is hoped that several invitations for the September meeting will be sent in.

At the same time Groups and Federations must remember the advisability of having active Delegate Councillors to represent them, as a meeting may take place at some time or other in a town more easily accessible for them than is usually the case.

In considering invitations the Council and the Executive Committee must always have in mind the necessity for a quorum of Councillors, and they cannot accept an invitation to a place which does not give promise of a sufficient number.

The activity of an organisation can well be judged by the proportion of members attending its Annual Meetings, hence it is undoubtedly the duty of every member desirous of the success of the Association to attend Annual Meetings and especially the next Annual Meeting, which will be held in London on Saturday, 3rd June, and which ought to be a large and representative gathering. There will be no wholesale revision of rules to consider or subjects of major importance to discuss, but it should be realized that an Annual Meeting is the members' opportunity for making suggestions, levelling criticism and otherwise bringing influence to bear upon the policy of the Association. I sometimes hear, for instance, that a correspondent of a friend of my informant wrote that a friend's friend said so and so in criticism of the misdeeds or shortcomings of the officers or Council of the Association, and I wish that these

criticisms might be made at an Annual Meeting where difficulties could be explained, false impressions be removed, suggestions be received and work of a constructive nature be accomplished.

Our Association by no means consists of its officers only. In fact it only exists to-day because within its ranks are many members who have contributed generously to its needs time and time again in the past, and who moreover are prepared to continue their support in the future.

Ideas for improvement, for progress, and for development are not confined to the officers alone, and the member who sits silent with such an idea has robbed the Association of something to which by the fact of his membership it is entitled.

I cannot help adding my voice to the appeal made on behalf of the National Esperanto Bazaar (1922). The object of this Bazaar is to raise a sum of money for our Premises Fund, and support to the Bazaar is direct support to the Association. We need bigger and better premises, and since, in two or three years' time, the lease of the present offices will expire, it behoves us to be ready with capital in hand sufficient to secure premises suitable for and worthy of the Association.

All success to the Bazaar in its efforts to this end!

CHARLES H. EDMONDS,
Hon. Secretary.

THIRTEENTH BRITISH ESPERANTO CONGRESS.

(London, Whitsuntide, 1922).

ARRANGEMENTS for the Congress are well in hand as will be seen from the circular which is sent with each copy of this number of *The British Esperantist*. Although, obviously, much depends upon the ability and work of the Organising Committee, a good deal hangs on the Congress Members themselves. At other Congresses practically no-one has joined until the last minute, and the Organisers have found it difficult to estimate the numbers likely to take part. Often their estimates have been on the low side and events have been overcrowded to the discomfort not only of the late-comers, but of everyone else. The Organising Committee of the London Congress can cater for all, but can only do so if tickets are purchased in time for them to make the necessary arrangements. This Congress should be the biggest

British Esperanto Congress yet if Esperantists will co-operate in making it so.

There are many difficulties peculiar to London, and a revision of the customary order of events has been found necessary, but it is anticipated that the order decided upon will meet with the approval of the large majority of Congress Members.

It only remains for those in sympathy with the objects of our movement who can find the time and the money to come to London, to make early application and induce their friends to do the same.

At the time of writing at least 700 more Congress Members are necessary to ensure the minimum of success desired, and it is hoped that each reader of these lines will become an advertising agent for the Congress.

(Mrs.) E. R. Edmonds, Hon. Secretary,
19 Dellcott Road, Welwyn Garden City.

ESPERANTO AT THE ROYAL INSTITUTION.

A MOST able address, illustrated by lantern slides, was given at the Royal Institution in London on March 24th by Professor F. G. Donnan, F.R.S., of University College, on the subject of "International Auxiliary Languages." Professor Donnan gave an unbiased summary of the chief attempts made to solve the language problem from the 16th century onwards, and evoked hearty applause by his reference to the great work done by Zamenhof. He described Esperanto as an "unparalleled success," and said that our movement was "the greatest and most successful linguistic enterprise the world had ever seen." This tribute, coming from a distinguished scientist, who, as he said, *personally* (this he emphasised) prefers Ido as a language, furnishes one more illustration of the high esteem in which our language and our movement are now held by fair-minded and thoughtful people outside our own ranks. Professor Donnan recalled the interesting fact that Dr. Max Müller had spoken in the very same room on the same subject over fifty years before, and quoted some of the words then uttered, to the effect that the problem of an auxiliary language could be solved and sooner or later undoubtedly *would* be solved.

We thank Professor Donnan for his excellent presentation of the subject, his high tribute to Esperanto, and his appeal to thinking men and women to study the problem for themselves.

THE LEAGUE OF NATIONS & ESPERANTO.

THE Replies of the B.E.A. to the Questionnaire of the Secretary of the League of Nations have been despatched. The Committee has prepared an impressive statement of the position of the Esperanto movement in Great Britain. A review of our forces reveals the fact that we have a solid body of fervent Esperantists who can be depended upon to serve the cause in every emergency. A revived feeling of hopefulness prevails. The mere circulation of our own Questionnaire and the Memorial to the League of Nations has led to a renewal of interest, for the conviction has gained strength that we are on the eve of a great forward move. The Committee desires to express its gratitude to the groups that have sent in replies. Some of these have been very valuable indeed. Leading business men and educationists have been approached and have written valuable letters in support of Esperanto. Some of these may be afterwards published.

And yet far too many group secretaries have simply ignored the Committee's communications. Such apathy on an important occasion like this reveals a deplorable want of appreciation of the situation.

THE GENEVA CONFERENCE.

THE British party for the Geneva Conference leaves Victoria Station, London, on Saturday, 15th instant, at 10 a.m. Arrangements have been made for housing the delegates in the Hotel Richmond, Geneva. The British delegates, some thirty in number, will be conducted by Mr. K. Graham Thomson, of the Scout Esperanto League. Professor W. E. Collinson, of Liverpool University, goes as an additional delegate of the Lancashire and Cheshire Federation. Miss Morton, of Huddersfield, has been forbidden by her doctor to undertake the journey, and the Yorkshire Federation has found another representative in Miss Louise Briggs, of Leeds.

THE MEMORIAL TO THE LEAGUE OF NATIONS.

THIS Memorial has now been signed by several Lord Mayors, Lord Provosts, Mayors, Provosts, Members of Parliament, University Professors, Clergymen, Educationists and leading men. Further copies may be had on application to Mr. W. M. Page, 31 Queen Street, Edinburgh, after his return from Geneva, at the end of April. Signed Memorials should be returned to him not later than the beginning of June.

THE ESPERANTO MAGAZINE FOR THE BLIND.

“**E**SPERANTA LIGILO” with its increasing circulation of 675 copies in 29 countries abundantly proves the value of Esperanto. Sent free to all blind Esperantists who require it, it brings all into touch with one another and with modern developments in education. It is helpful to all, and inspires many to become pioneer workers in less advanced lands.

Very sincere is the readers' gratitude to Mr. John Merchant, Dr. Edmond Privat, Herr Teo Yung, M. Th. Cart, and others for pleading its cause throughout the Esperanto press, and to all who respond by donations or by organising collections among groups, whereby half the sum needed for the current year has now been raised. All donations are gratefully acknowledged and information gladly given by the Hon. Treasurer, W. Percy Merrick, Woodleigh, Shepperton, England.

Mr. Merrick has sent us a list of donors for 1921 and 1922, which unfortunately we have not room to print, but we are sure that the spirit which prompted these gifts does not look for public acknowledgement. We heartily commend the cause to our readers.

ESPERANTO PROGRESS ABROAD.

BRASILIO.—Dro. Pires de Rio, Ministro de Publikaj Laboroj, ricevinte petskribon de S-ro Otto Reber, prezidanto de Internacia Ligo de Esperantistaj Poštsticistoj, sendis, je la 4a de Februaro, al la direktoroj de l'Posto kaj de l'Telegrafo la jenan ordonon: “Mi rekomendas ke vi sendu al la prezidanto de Brazila Ligo Esperantista, d-ro Couta Fernandes, supera telegrafofisto, liston kun la nomoj kaj adresoj de ĉiuj oficistoj kiuj jam scias Esperanton, ĝin lernas, aŭ estas al gi simpatiaj.” Per cirkuleroj la cititaj direktoroj sciigis ĉiujn poštaj kaj telegrafaj oficistoj pri tiu decido.

La tre grava asocio “Ligo de l'Komerco” en sia kunveno de 1-6a de Februaro, aprobis la jenan rezolucion prezentitan de S-ro Alberto de Almeida: “La Ligo de l'Komerco de Rio de Janeiro, konvinkita ke la lingvo Esperanto solvis praktike la problemon de la helpa internacia lingvo, montrigante en siaj multaj aplikoj, speciale en la komercaj rilatoj, kiel ilo kapabla plenumi la celojn de facila inter-kompreno kaj de popola alproksimigo, decidas:—Rekomendi insiste la lernadon de Esperanto en la komercaj lernejoj kaj institutoj.”

LYON.—Sesafoje depost 1917 Esperanto havis propagandan ekspozicion ĉe la Foiro de Lyon (1-15 marto) en budo 12 de l'grupo 47 en la novkonstruita Palaco. Kiel kutime tiu ekspozicio estis aranĝita sub direkto de S-ino Farges, direktoro de la Esp.-Oficejo kaj nun Delegitino de U.E.A., kaj enhavis riĉan materialon, kiun si pacience kolektis dum pli ol 15 jaroj: propagando, instruado, literaturo, gazetoj komerco, turismo, S.F.P.E., U.E.A., k.a.

La malfacilaj ekonomiaj cirkonstancoj iom post iom malaperas, kaj la negocado farigis tiun jaron ankoraŭ pli intensa ol antaŭe. *Nun* la Komitato de la Foiro *korespondas* en Esperanto; skribu al ĝi: Comité de la Foire, Hôtel-de-Ville, Lyon; sed ne petu reklamilojn en Esperanto, kiuj ne estas jam eldonitaj.

La naturscienco “Société Linnéenne de Lyon” kalkulas pli ol 500 membroj en plej diversaj landoj de l'tuta mondo, kaj baldaŭ festos sian centjaran jubileon. Ĝi akceptas uzi Esperanton por la korespondadon. Ĝi sendas al ĉiuj siaj membroj duonmonatan bultenon kaj jaran volumon, kiu enhavas plej interesajn studojn pri naturscienco. Informpetoj estu adresataj al S-ino Farges, Del. de U.E.A., 36 rue Victor Hugo, Lyon.

Wiesbaden.—La Urba Oficejo por trafiko presigis Esperante bele ilustritan gvidfolion kiun ili disdonos senpage. Niaj Wiesbadenaj samideanoj multe laboris por la afero kaj ni ĝoje rekomendas al nia legantaro la gvidfolion kiu estas havebla laŭ simpla mendo pošt-karte.

Internacia laborkongreso katolika en Luxembourg.—La 31an de julio ĝis 3a de aŭgusto okazos en Luxembourg 1a 2a internacia laborkongreso katolika. Ĉiulandaj samideanoj katolikaj kore estas invitataj. Detalajn informojn donos la nacia direktoro de Ika: Dro. T. P. Arendsen, The Mission House, Brondesbury Park, London, N.W. 6, kaj Centra Oficejo de Ika, Graz, Krmeliterpl, Aŭstrujo.

U.S.A.—Col. E. M. House continues his activities on behalf of an international language. We have received cutting from the Chicago Daily News of a powerful article which appeared in that Journal recently, mainly favourable to Esperanto.

Cerepovec.—La 12an Febr. en salono de Gubernia Poštsticisto sub gvido de esperantisto A. P. Drozdov estis aranĝita “Esperanta Danc-Vespero.” Ĉeestis pli ol 150 personoj kaj la profito estas ricevita je sumo Rub. 1,300,000. Post la vespero komencigis tri esperantaj kursoj kun nombro de 32 personoj, kiujn kondukas S-ro A. P. Drozdov.

KRONIKO.

NORD-ORIENTA Esperantista Federacio.—

La ĉiujara generala kunveno de la Fed. okazis en Temperance Institute, Newcastle, sabaton la 18an Februaro. Prezidis nia malnova samideanino S-ino S. E. Wright. La afera kunveno okazis posttagmeze. Kur-agigaj raportoj estis presentitaj de S-roj Murray, sekr., Fairbairn, prop. sekr., kaj Paine, kasisto. La supre cititoj reelektiĝis. Kiel prez-oni elektis S-ron R. G. Redpath. Post la kunveno okazis komuna temango. Nokte estis dancado, kantado, deklamado kaj salonludoj. La kunvenon vizitis pli ol 30 samideanoj el Newcastle, Gateshead, Wallsend kaj Ryton. Je la 9.30 vespere finiĝis tre sukcesplena konferenco.

South-Western Federation.—The First Annual Meeting will take place at Chalice Well, Glastonbury, on 20th May next. As this historical building has been turned into a Hostel, capable of holding 60 guests, it has been decided to make "a week-end" of the gathering. The charges are moderate. For particulars apply to the Secretary, Miss E. Hogg, at Chalice Well.

Glastonbury is famous as having been the cradle of Christianity in these islands.* Many races have left their mark there. The spot is, therefore, specially valued by all animated by Esperantist ideals. The great Abbey ruins, the caves in the vicinity and the magnificent Cheddar gorge, make the district one of unique interest to visitors, so it is hoped that a goodly number will take advantage of this week-end.

Liverpool.—La grupanoj ĝuis paroladon trafe faritan de Profesoro Collinson, M.A., Ph.D., pri la vortstrukturo de Esperanto. Li grupigis lingvojn laŭ apartaj kategorioj kaj komentariis pri ĉiu grupo, klarigante, ke Esperanto apartenas al la aglutinacia grupo. Li ankaŭ analizis la teorion de René de Saussure, kaj kontrastis ĝin kun la pretendoj de la idistoj. Sekvis interesaj demandoj kaj diskuto pri kelkaj el la punktoj pritraktitaj. Ĉi tiu vizito de nia samideano estis aranĝita sub la aŭspicioj de la Asocio de Diplomitoj, kies prezidanto Prof. Collinson estas.

Teddington.—On Wednesday, 15th March, Mr. F. O. Lechmere-Oertel conducted a "Half-hour" talk about Esperanto at the Women's section of the Adult School, Clarence Road.

* If any would like to read the story at length in the noblest poetry let him turn to "The Dawn in Britain," by C. M. Doughty.—ED.]

That the audience was keenly interested was apparent from the questions put at the close and the number of grammars and "keys" sold. Mrs. Hedger, of the Kingston group, gave striking instances of the value of the latter. In January last Mr. P. J. Cameron gave a lecture to the men's section of the same school, and it is considered that the effect of the two efforts justifies an endeavour to form a class in Teddington.

We heartily congratulate the workers and wish them every success.

Oxford.—Mr. S. Jackson Coleman, Barrister-at-Law, of Reading, delivered an enthusiastic address at the Adult School on the 19th March, on "Esperantism or Practical Christianity," with the result that an Esperanto class is being formed. Those interested should communicate with Mrs. Slater, 4 Park Crescent, Oxford. The classes will begin immediately after Easter.

Jorkſira Esperantista Federacio.—**"Josefo Rhodes Memorajo."**—La Federacio decidis honori la memoron de sia Prezidinto, Sro Josefo Rhodes, per la preparado kajeldonado de libro—*"La Vivo de Josefo Rhodes, pioniro de Esperanto en Anglujo,"*—kaj elektis komitaton, kiu prizorgas la detalojn necesajn.

La sekretario de tiu komitato petas helpon:—
1e, per interesaj informoj rilate al Sro Rhodes de tiuj, kiuj laboris kun li kaj intime lin konis (precipe dum la fruaj jaroj de nia movado).

2e, per mondonacoj al la eldona kaso.

3e, per antaŭ-mendoj de la libro, kiu estos eldonata je nur modera prezo, kaj kiu fariĝos konstanta memorajo de tre nobla, vigla kaj sindonema samideano.

Skribu al James H. Fitton, Meadow House, Shepley, nr. Huddersfield.

Rusa Help-Kaso de la Londona Klubo.—

Ni ricevis de S-ro P. J. Cameron, la kasisto de ĉi tiu kaso, raporton pri la sumoj ricevitaj kaj pri la elspezoj faritaj por helpi al rusaj malsatantoj. La raporto estas tro longa por presigi, sed interesatoj povas peti ekzempleron de ĝi de S-ro P. J. Cameron, 69, Schubert Road, London, S.W. 15.

OBITUARY.

REV. JOHN ANDERSON, Corstorphine, died on 27th March at the great age of 101. He was the oldest Esperantist in the world. He began to learn Esperanto at the age of 85, and up to the end retained a warm interest in the movement.

TRA LA LIBRARO.

Atenton sin turnu al la B.E.A. aŭ gaj prezlistoj.

KOMERCAJ Verkoj.—Ĝis nun ne aperis kompleta komerca lernolibro aŭ komerca Vortaro angla-Esperanta, sed ekzistas diversaj verketoj tre rekomendindaj por komercaj lernantoj de la lingvo. Inter ili estas *Pitman's Commercial Esperanto*, oportuna libreto verkita de S-ro W. M. Page, konsistanta ĉefe el represajoj el la *Esperanto Monthly*, en la formo de komercaj konversacioj kaj frazoj en la angla lingvo kaj Esperanto, kune kun bona kolekto da modelaj leteroj pri multaj diversaj komercaj. La verko estas tre bone presita, kaj taŭga por enpoŝigo. Alia utila libro estas *Practical Business Letters in Esperanto*, kiu aperis antaŭ 15 jaroj kaj do eble ne enhavas kelkajn el la pli modernaj terminoj, sed tamen estas plena je bonaj frazoj kaj letero pri ĉiuspecaj aferoj. En ĉi tiu libro ĉiu letero kaj frazo estas montrata paralele kun angla traduko. (Eldono franca—Esperanta de la verko estas ankaŭ havebla).

Ambaŭ verkoj bone elmontras la fakton, ke por uzi Esperanton en la komerco oni bezonas nur scion de la ĝeneralaj teknikaj terminoj, kaj ne devas pripensi ian specialan jargonon, sed simple kaj rekte esprimi la deziratan sencon uzante la ordinarajn vortojn de la lingvo. Eĉ kiam oni ne scias ian terminon aŭ se tia termino ne estas antaŭe uzita, oni tre ofte povas elpensi taŭgan formon aŭ klarigi la ideon per vortoj jam konataj.

Konversaciaj Libroj.—Du rekomendindaj frazlibroj por Esperantaj studentoj kaj vojaĝantoj estas (1) *Traveller's Esperanto Manual of Conversation* (angla-Esperanta) de D-ro J. C. O'Connor; kaj (2) *An Esperanto Conversation Book*, de S-ro A. J. Witteryck, kiu estas kvar-lingva kaj montras ĉiun frazon en la lingvoj angla, franca, nederlanda kaj Esperanta. Sajnas al ni ke la ĉefa utilo de tiaj verkoj ne estas en rekta uzado de la montritaj frazoj (kvankam multaj el ili povus esti tre utilaj laŭokaze), sed en elmontro de multaj ofte bezonataj ĉiutagaj vortoj, ne nur kiel apartaj vortoj aŭ radikoj sed en natura uzado en konversaciaj frazoj. Tio donas naturan aspekton al la vortoj kaj ligas ilin pli firme kun la koncernataj objektoj kaj ideoj. La libro de S-ro Witteryck kompreneble ankaŭ taŭgas kiel frazlibro por la angla, franca kaj nederlanda lingvoj.

Tradukoj de Francaj Poemoj.—(20 paĝoj. Eldonita de la Esperantista Centra Librejo). Tiu verketo ne allogos ĉiun Esperantiston, sed ĝi multe interesos kelkajn studentojn de

tradukado kaj versfarado. Estas bone sciate, ke la franca poezio "suferas," por tiel diri, pro certaj rigidaj reguloj kaj pro la manko de forta akcento en la franca lingvo; tiel ke reprodukti francan poemon en Esperanto ne estas ĉiam tiel facile kiel traduki poemon el pli libera lingvo, kiel la angla. Esperanto pro sia forta tonika akcento nepre devas iagrade ŝangi la ĝeneralan efekton de la ritmo kaj stilo de franca poemo. La verkinto de la nuna libro, S-ro J. Balliman, klarigis en sia *Antaŭparolo* la metodon laŭ kiu li celis kiel eble plej precize imiti la originalan ritmon en siaj tradukoj, kaj montras ke la ĝusta efekto estas trafebla nur per speciala traktado de la Esperantaj silaboj; kvazaŭ ne akcentante ilin tute tiel forte, kiel oni nature farus. Samtempe la tradukoj estas, alternative, ritmigeblaj laŭ la plena Esperanta maniero. S-ro Balliman certe tre zorge klopojis en sia tasko, kaj kvankam ni dubas ĉu li plene sukcesis en malfacila afero, la rezulto estas studinda kaj interesa.

TRA LA GAZETARO.

Por prezoj de abono k.t.p. oni sin turnu al la B.E.A.

LA Espero.—Tiu organo de niaj svedaj samideanoj estas ĉiam bone presita kaj praktike aranĝita. Lastatempe ĝi informis pri diversaj progresoj de la movado en Svedujo, inter ili la fakto ke certaj gazetoj, enpresa oklecionan kurson en Esperanto, ellaboritan de S-ro Harald Skog. En kelkaj urboj, ekzemple Gevle kaj Malmö, la loka agado estas tre vigla, kaj ni ne dubas ke vojaĝantoj al la Universala Kongreso en Helsingfors trovos bonan akcepton se ili trapasos Svedujon kaj vizitos laŭeble la tieajn grupojn. Por tiuj interesatoj ni citu la jenajn adresojn de kelkaj lokaj sekretarioj:—En Stockholm, S-ro L. Tell, Prästgårdsgatan 42; en Göteborg, S-ro J. I. Törn, Kaptensgatan 17; en Malmö, S-ro J. Petersson, Agnesgatan 1.

Esperantio.—Ni ne vidis, ĝis nun, ekzempleron de tiu ĉi nova gazeto, anoncita kiel "internacia ilustrita revuo por socia vivo, literaturo, arto, sporto, k.t.p." Tia revuo, per bona subteno, povus esti tre grava por nia movado; sed ĉu estas tro malfrue por ke la eldonantoj ŝanĝu la titolon? Sajnas al ni tre nekonsilinde aperigi gazeton kun nomo tiel simila al la ĉiekonata kaj necesega *Esperanto*, organo de la U.E.A. Ni petas ke oni tion konsideru!

Literaturo.—La ĉefa kontribuaĵo al la ĵus aperinta numero (Jan.-Marto 1922) estas *La Avara Kavaliro* de Puškin, tri-scena tragedio,

en bonega Esperanto kaj vere leginda. Por ekzempligi la stilon, ni citu la jenon el parolado de la Avarulo mem :—

La konscienco!—besto kun ungegoj
Gratanta koron, gast' neinvitita,
Kunparolanto teda, kreditoro
Plej postulema, sorcistin', pro kiu
La luno senlumiĝas, kaj la tomboj
Mortintojn en konfuzo for eljetas! . . .
Ne, kiu mem riĉecon elsuferis,
Tiu frivole ne malsparas tion,
Kion akiris li per sango propra.
Ho, se mi povus subterajon mian
De senindulcoj kaſi! . . . se el tombo
Mi povus veni, kiel garda ombro
Sur kofro sidi, kaj de la vivantoj
Trezorojn miajn gardi kiel nun!

Inter aliaj eroj estas *Uragano en la Dezerto*, tradukita el la pola lingvo; fabelo (kaj samtempe fablo) *Heliko kaj Rozarbo*; kaj trafa elcerpaĵo pri *Konkordo el la Parolado de la Majstro ĉe la Krakova Kongreso en 1912*.

Esperanta Ligilo.—Ni atentigas ĉiun, kiu konas varbitan aŭ varbeblan blindulon, al la fakteto ke ĉi tiu utila gazeto ankoraŭ aperas. Presita en la brajla signaro, sed tute en Esperanto, ĝi estas ne nur ligilo inter la blindaj Esperantistaj en multaj landoj, sed ankaŭ efika instruilo por helpi en ilia studado de la lingvo.

Nova Eŭropo.—Ci tiu estas bone redaktata monata organo, aperanta en Praha kiel "Esperanta Tribuno de la Malgrandaj Nacioj." Plenumante tiun rolon ĝi enhavas artikolojn pri kaj por nacioj kiuj estas malgrandaj, almenaŭ laŭ dimensioj aŭ enloĝantoj,—ne ĉiam morale aŭ historie! Ĉar en Eŭropo nun estas (en politika senco) pli da malgrandaj nacioj ol antaŭe, la gazeto espereble plenigas gravan lokon en nia movado kaj efike helpas gian progreson.

ESPERANTISTA CENTRA OFICEJO.

GRAVA AVIZO.—La oficistaro de la Esp. Centra Oficejo konsistas nun el la solaj jenaj personoj, kiuj dediĉas tempon al la Oficejo, ekstere de siaj profesiaj okupoj:

S-roj Gabriel Chavet, ĝenerala sekretario de la K. K. K.; Barono F. de Ménil, ĉefadministranto, kaj Leono Agourtine (ĝenerala propagando); F-inoj G. Gérard kaj Ch. Gaillot (administracaj laboroj).

Por faciligi kaj rapidigi la laboron, oni bonvolu adresi ĉiujn sendaĵojn laŭ la jena maniero:

Esperantista Centra Oficejo
51, Rue de Clichy, Paris-9e

La monsendojn oni adresos al la persona nomo de S-ro F. de Ménil, aŭ al lia poŝta ĉekkonto:

Paris 1er Arrondissement C. C. 8-60.

XIV. KONGRESO DE ESPERANTO.

(Helsinki (8-16 Augusto, 1922).

Adreso : XIV. Kongreso de Esperanto, Helsinki.

Telegramoj : Esperanto, Helsingfors.

Vojagkostoj.—Laŭ sciigoj ricevitaj per telegramo ili estas:

	Hull	Helsinki	Hull	
1a klaso	£11 4 0	Fmk. 1200	(£6 0 0)	
2a klaso	£8 0 0	Fmk. 960	(£4 16 0)	
3a klaso	£4 16 0	Fmk. 480	(£2 8 0)	

PAGOTAJ EN LONDONO.

(Ci tiuj prezoj en markoj estas ŝangeblaj laŭ la taga kurzo).

(Reira vojaĝo kalkulita laŭ kurzo Fmk. 200 = £1).

Vivkosto.—

Logejo.—

1a kl. mk. 35-70 (du litoj 50-100) tage.

2a kl. mk. 30-50 (du litoj 40-70) tage.

3a kl. mk. 25-35 (du litoj 35-50) tage.

Manĝoj.—Teo aŭ kafo kun buterpano. Mk. 5-6.

Matenmanĝo.—1a-3a. Mk. 12-15. (Malkaraj manĝoj Mk. 5-9).

Tagmanĝo.—1a. Mk. 20-25. 2a. Mk. 15. 3a. Mk. 12. 4a. Mk. 6-10.

Vespermanĝo.—Kiel la Tagmanĝo.

Kotizo.—Kongresano £1. Familianoj : edzino aŭ infanoj loĝantaj en sama hejmo 12/-.

Aliĝiloj.—Ciu samideano brita intencanta iri al la Kongreso povas ĝin ricevi de la subskribanto.

Monsendo.—Mono sendita rekte al Helsinki devas esti NUR per papermono aŭ per bankaj ĉekoj en angla valuto, (alie perdo okazos por la kongresa kaso). Por faciligi la aferon al britaj samideanoj la subskribanto volonte konsentos sendi ĉiun monon mem, sed deziras ricevi poŝt kaj ŝangelspezoj, ĉirkaŭ 1/-.

Pasportoj.—La Loka komitato klopodas, por ke la vizo al Finlando estu donitaj sen formalajoj. Detaloj sekvas en estonta artikolo.

Ekskursoj.—Sciigoj estos troveblaj en cirkuleroj sendotaj de la Loka Komitato al ĉiuj aliointoj.

Postkongresoj.—Stockholm (15-16 Aug.) kaj Copenhagen (18-19).

Por Pluaj Sciigoj skribu al la subskribanto. Aliĝu kiel eble plej baldaŭ kaj sciigu en kia klaso vi deziras vojaĝi. (Vidu B.E. de februaro, p. 16).

P. BLAISE,

125, Hambalt Road, Clapham, London, S.W.4

Arcturus sails from Hull, 3rd August.

Congress, 8th August.

Returns : to Hull s.s. Astrea 16 Aug.

to Hull s.s. Arcturus 23 Aug.

to Stettin and/or Lubeck 19 Aug.

to Copenhagen 20 Aug.

EKZAMENOJ.

SINJORO WM. HARVEY, Hon. Sek. de la Ekzamena Komitato, deziras atentigi korespondantojn, ke lia loĝado en Hove jam finiĝis, kaj petas, ke oni bonvole notu liajn adresojn :—

gis 30a de Aprilo—ĉe Molyneaux, 62 Queen St., Edinburgh ;

post tiu dato—17 St. Clair Terr., Morningside, Edinburgh.

B.E.A. OFFICIAL NOTICES.

CANDIDATES FOR MEMBERSHIP.

Miss A. BLAIR, 74 Rothbury Terrace, Newcastle-upon-Tyne; PHILIP D. BLAKE, 140 Bedford Court Mansions, Bedford Square, W.C. 1; PARLEY PARKER CHRISTENSEN, Morrison Hotel, Chicago, Ill., U.S.A.; WILLIAM R. E. COLES, Monument Chambers, King William Street, E.C. 4; DOUGLAS H. DAVIS, 101 East Dulwich Grove, East Dulwich, S.E. 22; JOHN CHARLES DIXON, 33 Rushden Road, Levenshulme, Manchester; Miss HARRIET M. FURBER, Sedge Ford, Whitechurch, Salop; CHARLES G. GLASS, 37 Coldstream Street, Llanelli, S. Wales; Miss ISABELLA WATSON, Finlaystone Street, Coatbridge.

GUARANTEE FUND, 1922.

	£ s. d.
Carried forward from preliminary list inserted in the March "B.E." (corrected figure)	381 13 6
Allen, A., Newcastle	1 10 0
Anderson, J. Boyd, Edinburgh	2 0 0
Bailey, H. T., London	1 0 0
*Baldwin, F., London (Total, £1 10s.)	0 10 0
Bournemouth Esperanto Society (Total, £3)	2 0 0
*Bridger, H. J., Erith	1 0 0
Brown, D., Glasgow	1 0 0
*Clayton, F. C., Birmingham	5 0 0
Clegg, F., Newcastle-on-Tyne (Total, £1)	0 9 6
*Crowley, Dr. R., Welwyn Garden City	1 0 0
*Dobson, J. W., Chester	0 5 0
Dodd, J. L. J., Wallasey	1 0 0
*Farmer, G. N., London	3 0 0
Gibbens, G., Reigate	2 0 0
Hall, R., Peterborough	1 0 0
Harvey, Wm., Edinburgh	1 10 0
*Hill, C., St. Leonards-on-Sea	1 0 0
Hurgon, R. K., Croydon	0 5 0
*Lechmere-Oertel, F. O., Hampton Wick	5 0 0
Maling, A. T., New Headington	0 5 0
*Mason, Rev. H. O., Thaxted	0 5 0
*Nowell, Rev. H. N., Northwich	1 0 0
Sherris, Miss G. M., Bristol	0 10 0
Silcox, Miss L. C., Bath	2 0 0
*Thomson, K. G., London	0 10 0
Westoby, Mrs. E. M., Barnet	1 0 0
	<hr/> £417 13 0

* Guarantees yearly till further notice.

On behalf of the Council I express warm thanks to all who have generously supported the Association, by Guarantee, or by contribution to one of the various Funds for specific objects.

The Guarantee Fund for 1921 amounted to £537. It is hoped that those Guarantors who have not yet renewed their guarantee for the current year will do so. Forms of Guarantee on application.

MONTAGU C. BUTLER.

FAKO DE KORESPONDO.

Tie ĉi estas presataj anoncoj de legantoj de la gazeto kiuj deziras korespondi kun aliaj Esperantistoj. Ciu anoncanto devas pagi 9 pencojn (aŭ 4 stampitajn respondkuponojn) por tri linioj, kaj tri pencojn (aŭ 2 stampitajn respondkuponojn) por ciu plua komencita linio. Ciu membro de la Brita Esperantista Asocio havas rajton je unu senpaga anonco. Bonvolu sendi anoncojn al la Sekretario de la B.E.A., 17 Hart Street, Londono, W.C. 1, kaj skribu legeble. Oni akceptas unian respondecon pri eraroj kaŭzitaj de nelegebla skribmaniero.

39. **Anglujo.**—Edwin Smith, studento, 32 Gladstone Street, Bradford, dez. kor. kun gefrauloj.

40. **Erujo.**—Aleksandr Trofimovič, studento, Instituto Komerca, Samoilenco, Rostov sur Don, pri la stato de Esperanto en Eŭropo.

41. **Anglujo.**—F.ino. Emily C. Haynes, S-ro. S. G. Hines, 58 Quebec Street, Wakefield, dez. kor. kun Esptoj. en Italuje.

LIFE MEMBERS.

H. FITCH, Banbury; E. WILDBERGER, Portuguesa. E. Africa.

CANDIDATE FOR FELLOWSHIP.

WILLIAM BAYES, Leicester.

DELEGATE COUNCILLOR.

Canning Town, J. H. PARNUM. Correction: St. Helens, C. J. JONES, not G. T. JONES.

EXAMINATIONS.

These will be held at the Offices of the Association, 17 Hart Street, London, W.C. 1, as follows:—

Preliminary: 6.30, Monday, May 1st. Fee, 1/6.

Advanced: 6.0, Tuesday, May 2nd. Fee, 3/-.

Candidates should give notice of their intention to attend.

DONATIONS TO GENEVA CONFERENCE FUND.

LEITH ESPERANTO SOCIETY, £2; J. BREDALL, £1; C. A. FAIRMAN, 10/-; LONDON ESPERANTO CLUB, £1; ABERDEEN ESPERANTO SOCIETY, 10/-; Mr. and Mrs. W. E. CLAYTON, £2; Col. G. S. ROBINSON, 10/-; smaller sums, £1 14s.

DONATIONS TO B.E.A.

Per A. SHARP, £2 5s. 6d.; P. D. BLAKE, £1 12s.; T. P. GANDELL, £1; F. W. ALLSOP, 10/-.

DONATIONS TO PUBLICATIONS FUND.

Dr. J. POLLEN, £2; J. BREDALL, 13/-; JOHN HILL, £1 8s.; smaller sums, 12/-.

DONATIONS TO PREMISES FUND.

Sale of Waste Paper, 12/6; T. J. RELF, 10/-; J. BREDALL, £1; smaller sums, 14/-.

DONATIONS TO PROPAGANDA FUND.

Mrs. GILLETT, 10/-; J. BREDALL, £1; Miss E. MEYER, 10/-; smaller sums, £2 2s. 6d.

PASSED PRELIMINARY EXAMINATION.

GEORGE J. C. MAIDMENT, *GEORGE E. A. ATKINSON, London; *CHRISTINA MORRISON, *ELIZABETH MOULTRIE, *JANET MORGAN, *MARGARET C. ANDERSON, *NETTIE VEITCH, *MARGARET DUNCAN, *JANIE B. SHEARER, *MARGARET H. M. CHISHOLM, *LILY SHEARER, *MARY P. McFIGGANS, *JANE E. J. THOMSON, *CATHERINE DUNCAN, *ANNIE J. FLETCHER, *ISABELLA M. COCHRANE, *ANNIE R. G. WATT, Dunfermline; *ELIZA WHITE, Burntisland; *HERBERT E. CROSS, *FLORENCE E. CROSS, *FRANK W. CASTLE, JOHN D. SMITH, Rosyth; *HARRIET M. FURBER, Whitechurch, Salop.

PASSED ADVANCED EXAMINATION.

DAVID TILLY, Whangarei, N.Z.; *ADOLPHE D. E. DORTENCOURT, *EDGAR J. SMITH, Brighton; *FREDERICK E. WADHAM, London; *JOHN E. DIXON, Blaketown, Greymouth, N.Z.; WILLIAM L. WATERMAN, Torrensville, South Australia; *JOHN KEILLER, Liverpool.

* Denotes that candidate has passed with distinction.

WM. HARVEY,

Hon. Sec., Exams. Board.

25th March, 1922.

Notice is hereby given that the next meeting of Council will be held on Saturday, 15th April, in the Friends' Meeting House, Bournville, Birmingham, at 3.0 p.m. The agenda has been sent to all Councillors by post.

MONTAGU C. BUTLER, Secretary.

Divine Service in Esperanto will be held in St. George's Church, Hart Street, London, W.C. 1, on Sunday, 14th May, 3.15 p.m. Tea, 4.30, at 16 Hart Street.

LA JUNA STUDANTO

SUPPLEMENT TO "THE BRITISH ESPERANTIST."

N-RO 4

APRIL, 1922.



Competition for Boys and Girls. (Sixth Series)

Conducted by
Miss JANE BAIRD.

This Competition is limited to boys and girls of not more than 15 years of age. Competitors must write their solutions on a postcard addressed "KONKURSO," c/o Miss JANE BAIRD, 95 Bellevue Road, Edinburgh, and add their age and the name of their school. A Monthly Prize will be given, and at the end of the Competition special prizes will be awarded to those who obtain the highest number of marks.

N.B.—It must be understood that Solutions are the competitors' unaided work.

In schools where Esperanto is taught it is suggested that the teacher collect the cards and send them in under an envelope, to save postage.

FOURTH COMPETITION.

Postcards to be sent not later than 6th May.

(a) MINERALAĜOJ KAJ GEMOJ.

Eltrovu la nomojn (nur radikojn) de mineralajoj kaj gemoj, kaŝitajn en la jenaj frazoj :—

1. Kune kaj interkonsente ili celados ĉiuj al la vero, al la felico.
2. Se iam venos tiu felica tempo, ĝi estos la frukto de konstanta kaj senlaca laborado.
3. En tiu momento triumfe realigis la sapiro de jarmiloj.
4. Li ŝvitias ankoraŭ super la alfabeto.
5. Dek-tri estas la dek dno de la diablo.
6. Pronomoj mia, min, kaj mi, en la mondo regas ĉiam tri.

(b) —ONO.

Divenu la vorton kun finigo (nesufiksa) — ONO, kiu estas :—

1. La ono de mangaj-spicajo kaj samtempe akcepta ĉambro.
2. La ono de melodio kaj samtempe svisa distrikto.
3. La ono de kvanto kaj samtempe konstrui el ŝtono.
4. La ono de hepat-sekrecio kaj samtempe rubando.
5. La ono de memoriga libertago kaj samtempe florajo.
6. La ono de interna parto de arbo selo kaj samtempe apogilo.

RESULT OF THE SECOND COMPETITION.

The highest number of marks in this Competition has been gained by :—

EMMA SMITH (Age 12).
Green Lane Council School, Patricroft.

Honours List (12 marks).—E. Britton, V. Sissons,

Northcote Girls' Schools, Armley, Leeds; L. Birchenough, H. Davies, J. Firth, J. Mawson, L. Scott, W. Smith, Beech Street Council School, Patricroft; P. Alflatt, E. Bury, E. Boardman, E. Davies, N. Firmstone, M. Fry, A. Hardman, B. Hayes, J. Hilton, F. Hanrahan, E. Jones, M. Kitchen, E. Kershaw, D. Lofthouse, L. Pendlebury, A. Pollitt, H. Tingle, E. Tomlinson, M. Tonkin, E. Wallwork, Green Lane Council School, Patricroft; A. Carter, W. Clark, C. Hobbs, L. Pearce, E. Thomasson, R. Thomasson, A. Waldron, A. Wood, St. Paul's Boys' School, Worcester.

Hon. Mention (11 marks).—M. Douthwaite, Northcote Girls' School, Armley; N. Hilton, T. Ireland, Beech Street Council School, Patricroft; I. Ballinger, E. Bottomley, N. Brittain, E. Bristow, L. Banks, N. Barlow, A. Chapman, L. Chappell, F. Cottam, E. Dyson, S. Davenport, M. Evans, A. Edward, S. Flawith, D. Gardner, E. Grayson, E. Hindley, L. Holt, E. Hesketh, G. Hale, T. Holland, D. Hollinrake, S. Hooley, F. Hazell, J. Hallsworth, H. Higham, E. Jones, C. Jacklin, F. Jaques, G. Kennedy, F. Makin, E. McCormick, T. Moss, A. Moss, W. Newton, J. Nettles, G. Owen, J. Page, F. Pickles, J. Peters, J. Reeves, M. Rayner, A. Rimmer, C. Soughton, F. Stuffins, H. Tonge, W. Thorley, J. Twigg, L. Williams, S. Wynn, L. Worthington, B. Walmsley, J. Williams, J. Warrington, Green Lane Council School, Patricroft.

SOLUTIONS.

(Second Competition, Supplement, Nro. 2.)

(a) Arboj :—(1) prun, aln; (2) laŭr, tili; (3) meriz; (4) pir; (5) avel.

(b) Kvadrato :—katar; arane; tapet; anemi; retin.

Competitors on Roll, 204.

GRAVA ANONCO.

Junula Kunveno okazos dum la Pentekosta Kongreso en Londono. La Kunvena organizanto tre deziras ricevi sugestojn rilate al la Kunveno, kaj helproponojn. Bonvolu sendi al la Organizanto de Junula Kunveno—

B.E.A., 17, Hart Street, W.C. 1.

NOTOJ	PRI	WILLIAM (SEKSPIR)	SHAKESPEARE.
-------	-----	----------------------	--------------

Kiu estis Shakespeare?

Oni demandis tion ĉe ekzamenoj antaŭ nelonge. Unu knabo respondis jene :—

“Shakespeare verkis tragediojn, komediojn kaj erarojn.”

Alia knabo skribis, “Shakespeare estas fuĝaĵo, kiun ni devas lerni ĉe lernejo. Oni diras ke ĝi estas poezio, sed ĝi tute ne estas. Ĝi estas nur babilado.”

Kompreneble, la legantoj de la “Junia Studanto” multe pli scias pri Shakespeare kaj espereble ili trovas tre interesa la studadon de liaj dramoj.

APRIL.

Aprilo estas la monato en kiu la burĝonoj sur la plantoj kaj arboj malfermiĝas.

La unua tago estis antaŭe, dum multaj jarcentoj, festo kiam personoj ludis ŝerce, unu kun aliaj. Tiaj kutimoj estis tre disvastigataj; ĉe en Hinduo, troviĝis la ŝerca festo. En Francujo, oni nomas la trompaĵon "Aprila fiŝo." En Anglujo oni nomas la trompiton "malŝagulo de Aprilo."

La Paska festo okazas dum Aprilo. Ĝi ankaŭ estas tre antikva. Ĝi signifas la kreadon de vivantaj estaĵoj; la burĝonoj aperas sur la arboj, la greno kaj junaj ŝafidoj kaj kapridoj sur la kampoj. Ĉiuj ĝojigas.

Multaj antikvaj kutimoj rilatas al Pasko. En preskaŭ ĉiu lando de Eŭropo, ankaŭ en Azio, ovoj estas la simboloj de renaskiĝo. Junaj studentoj kiuj korespondas kun Hungaroj, Ĉeĥoj kaj Germanoj, sendube ricevos poštarkojn montrantajn ovojn, kovritajn de brile koloritaj desegnaĵoj artistaj. Eble ankaŭ sur la bildo, estos leporo, ĉar laŭ legendo, la leporo produktas la paskajn ovojn.

En cejlona temploj, ofte pendas bildoj kiuj montras leporon kaj cirklon. Laŭ rakonto, Buda metis la leporon en la lunon, ĉar la leporo oferis sian vivon por savi la profeton kiam li estis malsata.

Personoj el la Dramoj de Shakespeare. La persono priskribita en la Marta numero estas Bottom, la teksisto, kiu ludis la rolo de Piramo. La dramo estas "Songo de Someromeza Nokto."

LA TRI PORKIDOJ.

Antaŭ longa tempo estis granda porkino kiu havis tri porkidojn.

Unu tagon, la tri porkidoj diris al la patrino ke ili deziras foriri por vidi la mondron. "Nu bone," diris ŝi, "porkidoj kiuj ĉiam restas hejme ne saĝigas. Foriru kaj vidu la mondron."

Unu porkido iris orienten, la dua iris okcidenten, kaj la tria iris rekte antaŭen. Post kelka tempo la unua porkido renkontis virojn, kiu portas pajlon.

"Ho, sinjoro," diris ĝi, "bonvolu doni al mi iom da pajlo, por ke mi konstruu domon."

"Prenu iom," respondis la viro.

La porkido prenis la pajlon kaj konstruis domon. Poste ĝi fermis la pordon, kaj kuŝis por dormi ĉar ĝi estis tre laca. Baldaŭ aŭdiĝis frapado ĉe la pordo, kaj ĝi rigardis el la fenestro, kaj vidis lupon, kiu diris ĝentile, "Porketo, porketo, enlasu min."

"Tute ne," respondis la porkido, "mi ne enlasos vin."

"Ho!" respondis la lupo, kiu havis grandan

malsaton, kaj kolerigis, "se vi ne enlasos min, mi blovos kaj blovados ĝis mi renversos vian domon."

Do li blovis kaj blovadis tiel longe kaj tiel forte ke baldaŭ la domo renversiĝis. Tiam li manĝis la porkidon kaj foriris.

La dua porkido renkontis viron, kiu portas dormajn bastonojn.

"Ho, sinjoro!" diris ĝi, "bonvolu doni al mi kelkajn bastonojn por ke mi konstruu domon."

"Prenu ilin," respondis la viro.

La porkido prenis la bastonojn kaj konstruis domon. Baldaŭ la lupo venis, frapis la pordon kaj diris, "Porketo, porketo, enlasu min."

"Tute ne," respondis la porkido, "mi ne enlasos vin."

"Ho!" respondis la lupo, kiu denove estis malsata, "se vi ne enlasos min, mi blovos kaj blovados ĝis mi renversos vian domon."

Do li blovis kaj blovadis tiel longe kaj tiel forte ke baldaŭ la domo renversiĝis. Tiam li manĝis la porkidon kaj foriris.

La tria porkido renkontis viron kiu portas brikojn.

"Ho, sinjoro!" diris ĝi, "bonvolu doni al mi la brikojn, por ke mi konstruu domon."

"Prenu ilin," respondis la viro.

La porkido prenis la brikojn kaj konstruis domon. Baldaŭ la lupo alvenis, frapis la pordon kaj diris, "Porketo, porketo, enlasu min."

"Tute ne," respondis ĝi, "mi ne enlasos vin."

"Ho!" respondis la lupo, kiu denove havis grandan malsaton, "se vi ne enlasos min, mi blovos kaj blovados ĝis mi renversos vian domon."

Do li blovis kaj blovadis sed li ne povis renversi la domon.

(*Ĉu la lupo manĝis ĉi tiun porkidon? Legu la Majan numeron!*)

JAPANA RAKONTO.

LA VIRO, KIU DEZIRIS PLI DA SPACO.

Iam vojaĝanto transiris riveron, en boato, kune kun multaj aliaj pasaĝeroj. La boato estis tre malgranda kaj ĉiuj sin sentis tre varmaj kaj nekomfortaj. Dezirante pli da spaco la vojaĝanto pretekstis serĉi ion.

"Kion vi serĉas?" demandis unu el la kunvojaĝantoj.

Malgaje li respondis: "Antaŭ nelonge mi kaptis serpenton, kaj metis ĝin en kaĝon por porti ĝin hejmen, sed iel prosperis al ĝi liberigi, kaj mi ĝin serĉas."

Tuj ĉiuj apudstarantoj ekkriis: "Serpento! Serpento!" kaj sin movis kiel eble plej malproksimen for de la vojaĝanto, tiel ke ne plu ĝenis lin la homamaso.

Tradukita de J.B.